Esperantologio / Esperanto Studies **1** (1999), 16–20

La sencovasteco de kelkaj vortoj en *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto.*
Eseo por instigi al diskutado

Paul Neergaard (1907 02 19 – 1987 11 13)[1,2]

Gaston Waringhien havis antaŭ si gigantan taskon, kiam li redaktis la difinojn de *Plena Ilustrita Vortaro* (*PIV*). Lia plej granda merito estas, ke li skrupule kaj fidele esploris la sencon de ĉiuj Fundamentaj, oficialaj kaj Zamenhofaj radikoj kun iliaj plej gravaj kunmetaĵoj, surbaze de miloj da ekzemploj de ilia uziteco, kaj redonis el la klasikaj tekstoj multajn el tiuj ekzemploj en la vortaro. En tio li ja sekvis la striktajn principojn de scienca leksikografio: reprodukti en la vortaro la faktan uzadon de la vortoj en la praktika vivo.

Tion li ne povis fari pri ĉiuj vortoj registritaj en la vortaro. Por kontentigi la bezonojn de la moderna vivo kaj ne nur respeguligi la uzadon en la limigita literaturo de Esperanto, kiu estas plejparte beletristika kaj organizaĵa, li devis kritike enmeti multajn scienc-teknikajn terminojn. Li devis akcepti ankaŭ multajn *ĉiutagajn* esprimojn eĉ se ili, pro la speciala karaktero de la Esperanto-lingvosocio, malofte aŭ apenaŭ uziĝis. La konsekvenco estis, ke li devis decidi, plej ofte en interkonsiliĝo kun sciencistoj-teknikistoj kaj aliaj fakuloj, pri selekto de internacie gravaj vortoj kaj pri la difinado de ili.

Uzante tra la jaroj PIV, mi en ne malmultaj kazoj trovis min en hezito antaŭ difino donita, aŭ mi povis ĝin ne akcepti. Lastatempe mi komencis fari notojn pri miaj observoj, kaj ilin mi volas ĉi tie sugeste prezenti por diskutado. Temas parte pri teknikaj vortoj apartenantaj tamen al la komuna vortaro (la pli specialajn terminojn, afero de specialistoj, mi ne tuŝas), parte pri kelkaj vortoj uzataj metafore.

Por facila referenco mi aranĝas ilin laŭalfabete.

---

[1] *Noto de la redaktoro:* Tiu ĉi artikolo estis verkita por festlibro honore al Ivo Lapenna okaze de ties 75-jara naskiĝtaga festo en Kopenhago la 15-an de decembro 1984. Ĝi aperas ĉi tie laŭ permeso de Birthe Lapenna kaj Jesper Neergaard. La festlibro ĝis nun ne estas publikigita. – Michel Duc Goninaz, kiu revizias la *Plenan Ilustritan Vortaron*, skribis al mi, konatiĝinte kun tiu ĉi artikolo, ke li uzis ĝin "por kelkaj utilaj korektoj" (letero de 1999 02 24).

[2] *Noto de la aŭtoro:* Profesoro d-ro, estinta direktoro de Ŝtata Instituto de Sempatologio por evolulandoj, Kopenhago. Fellow, Indian National Science Academy (New Delhi), Honorary Fellow, National Academy of Sciences, India (Allahabad), Membre d'Agriculture de France (Paris). Vicprezidanto de la Akademio de Esperanto.

Mallongigoj
PIV = *Plena Ilustrita Vortaro*
(F) = Fundamenta
(O1), (O2) ktp. = vorto oficialigita en la unua, dua ktp. Oficiala Aldono
(Z) = Zamenhofa

1. "Teknikaj" vortoj

Amendi. Laŭ PIV: (1) Fari oficiale plibonigajn modifojn en leĝo aŭ leĝpropono; (2) Ĝustigi eraron en leĝa dokumento. – Fakte la vorto estas uzata ne nur por leĝaj dokumentoj, sed por kiuj ajn dokumentoj, manuskriptoj, do en pli vasta senco.

Apreci (aprezi). PIV: Kompetente taksi la artan valoron de io. – La vorto uziĝis en pli vasta senco: taksi la valoron ne nur artan de io, sed plej ofte rekoni ĝenerale la meriton de iu agado aŭ aganto.

Asimili (O2). PIV (kvara difino; filologia): Anstataŭigi unu parolsonon per alia sono, kiu pli similas al la apuda sono. – Mi opinias, ke pli ofta estas la signifo leksikologia por vorto enkondukita en lingvon el alia lingvo kaj adoptante la deklinacion de la lingvo ricevinta la vorton: pelargonio, pelargonioj (*Pelargonium*, latina, ne estas deklinaciata.)

Aspekto (O1). – La ĉefan (unuan) difinon: "Maniero, en kiu iu aŭ io sin prezentas al nia vido", mi tute aprobas, sed ŝatus aldoni ekzemplojn de tre ofta uzado: *diversaj aspektoj de afero, aspektoj de kibernetiko*; *la aspekto de malpliiĝanta nombro de naskoj en la okcidenta mondo.*

Aŭtentika (O1). PIV: Nedubeble vera, originala, nefalsita. – La vorto, laŭ internaciaj tradicioj, estas uzata ne nur por ekz. tekstoj k.s., sed ankaŭ pri personoj. Do en la difino estu ne nur *ne falsita*, sed ankaŭ *ne falsa*, aludante al persono.

Dubleo. PIV: orplakita juvelo. – Ne nur juvelo. Mia poŝhorloĝo ankaŭ ricevis ordubleon; oni ankaŭ parolas pri arĝenta dubleo.

Familiara (O2). PIV: Tiel senceremonia kiel interne de familio. – Tamen la vorto, laŭ mia sperto kaj propra uzado estas uzata ne nur en tiu malvasta senco, sed en tiu de 'intime konata, sperta pri' (kp. Wüster: *vertraulich*, en la germana).

Farmi (F). PIV: Lue preni laŭ kontrakto por difinita tempo teron, bienon, por ĝin kulturi kaj uzi je sia propra risko kaj profito. – Nuntempe tre malofte la vorto estas uzata en sia Fundamenta senco. La substantiva *farmo* certe ne malpli ofte ol *bieno* estas uzata en ĉi ties senco. La verbon *farmi* oni pro klareco povas uzi (kaj fakte uzas) en la formo *farmlui.* En *El Popola Ĉinio* mi trovis la formon *farmejo* por *farmo* en la signifo de 'bieno'. Estus utile reguligi tiun uzadon de la vortoj *farmo* kaj *farmi* laŭ la fakta uzado de tiuj vortoj. *Farmo* do nun grandparte anstataŭigas la vorton *bieno.*

Genro estas en PIV difinita kiel terminoj de gramatiko kaj de botaniko. Sed en la difino sub *meningito* tiu ĉi vorto estas uzita ĉi-nekonforme, en tro larĝa senco. Ĉu temas pri transglito de *ĝenro* en ties tamen pli speciala literatura, arta signifo de 'kategorio'?

Geodezio (O2). PIV: Branĉo de matematiko, celanta difini la formon kaj grandon de la Tero aŭ de sufiĉe granda parto el ĝi, por ke estu necese konsideri ĝian kurbecon. – Tiu ĉi difino ŝajnas al mi tro malvasta. Ĝi devus inkluzivigi aplikadon ĝeneralan de termezurado.

Handikapo. PIV: Konkurso, en kiu la ŝancoj de ĉiakvalitaj konkurantoj estas egaligitaj per iaj malavantaĝoj truditaj al la pli sortfavorataj. – Evidente tro malvasta signifo kiel nura sporta termino. Necesas aldoni difinon de la nun ĉefa signifo, tiu de invalido en la plej vasta senco. La vorto *malavantaĝulo* (ekuzita de *Monato*) en tiu signifo ne taŭgas, parte ĉar malavantaĝo ne nepre estas nur korpa aŭ mensa, sed povas baziĝi sur multaj aliaj faktoroj: ĉu ekz. afrikaj malsatantoj aŭ ekspluatitaj proletoj ne estas malavantaĝuloj?

Humanisma (kunmetaĵo el *humana*, (O1)). – Ŝajnas al mi tre dezirinde, konforme al fakta lingouzado en Esperanto, aldoni difinon, kiu rilatas al la esprimo *humanismaj sciencoj* (filozofio, lingvistiko, historio, literaturo, juro ktp.), kontraste al la matematik-natursciencoj.

Inserti. – PIV donas difinon nur de du sciencaj terminoj, botanika kaj anatomia. La uzado en la komuna lingvo estas tiu de: 'enmeti aldonaĵon en tekston'.

Junto estas difinita en PIV por teknika termino kaj por fonetika termino. En la moderna lingvo pro bedaŭrindaj faktoj uziĝis *junto* en la signifo de diktatorece reganta grupo de personoj, plej ofte oficiroj, kiuj puĉe prenis al si la potencon.

Kapacito en PIV difinita kiel termino de fiziko. Ĉu ne tro limigita senco? Mi volus aldoni difinon pri speciala teknika kapablo, ekz. *ekonomia kapacito de komerca entrepreno, la militeca kapacito de NATO kompare al tiu de la orienteŭropa bloko, kapacito de ŝarĝboato.*

Konfronti ricevis en PIV pure juran difinon. – La vorto bezonas difinon pli vastan konforme al ĝia komunlingva uzado: 'meti iun aŭ ion antaŭ problemon, starpunkton aŭ agadon malakordiĝantan, frontigi en defio aŭ malamikeco, venigi en situacion de opozicio'.

Kvaranteno (F). PIV: Restado sub kuracista observado en izolita loko, trudita de registaro al personoj aŭ varoj venantaj el infektita lando. – La vorto havas, internacie, iom pli vastan sencon, ne nur tiun de retenado, sed ankaŭ tiun de alia regulado por preventi enkondukadon de infektaĵoj el unu teritorio en alian.

Limonado (F). La vorto nun ĝenerale alprenis pli vastan sencon ol tiun de citrona trinkaĵo: *oranĝa, framba* ktp. *limonado*, ne parolante pri la abomenaj industriproduktoj el malpli difinitaj gustigaj substancoj.

"Militara". – Treege kaj ĝene mankas en Esperanto vorto kun la signifo de la angla *military*, franca *militaire*, germana *militär*, hispana kaj portugala *militar*, ktp., ĉar *milita* referencas rekte al milito, ne al la komplekso de armeo, armado ktp. Ĉu akcepti *militara* spite al ĝia homonimeco al la sufikso *ar'*? Ekzistas vortformoj paralelaj: *sanitara* (Z), *perpendikulara* (Z), *sekulara*, *sekundara* k.a. Mi pledas por kuraĝa alpreno de la vortoj *militaro*, *militara*. La homonimeco kun *militaro* en la signifo de 'aro da militoj' certe ne kreos grandajn problemojn. Finfine estas ja akceptitaj en PIV *militarismo* kaj *militaristo*.

Papero (F). La signifo elmetita en la 3-a difino en PIV: "Jura aŭ financa dokumento, skribita aŭ presita sur tia folio", nun plivastiĝis kaj estas uzata por kiu ajn dokumento, precipe pri sciencaj-teknikaj raportoj. Tiu uzado ŝajnas esti disvastigita en plurajn lingvojn el la angla.

Perversa (Z). PIV: Inklina al malbonfarado, distinge de *perversio.* Devio de la seksa instinkto, kiu, repuŝata de la cenzuro, provas kontentigi sin en nenormalaj, arkaikaj formoj (samsekseco, sadomasoĥismo, ekshibicio, fetiĉismo ktp.). – Sub influo de la moderna psikologia medicino oni certe devas revizii tiun ĉi difinon de *perversio*, kaj mi dubas ĉu *perversa* en la kuranta lingvouzo ne estas uzata precipe en la signifo de 'perversia'.

Populacio. Laŭ PIV nur "statistika homamaso". – Sed la plej ofta signifo tutcerte estas simple tiu de 'enloĝantaro'. Cetere, en la biologio, ĝi estas termino ne nur por homoj kiel 'statistika homamaso' sed ankaŭ por animaloj kaj vegetaloj.

Potencialo (Z). PIV limigas la signifon sub difinoj de du fizikaj terminoj, kaj *potenciala* kiel filozofia termino (*potenciala signifo de vorto*). – Mi opinias, ke *potencialo* internacie havas pli vastan signifon, nome tiun de 'eblo por disvolviĝado aŭ estiĝo'.

Resurso (ne en PIV). Tiu ĉi grava vorto en la moderna lingvo mankas en PIV. Ĝin ne povas anstataŭigi *provizo*, kiu estas en PIV difinita tiel: "Abunda materialo aŭ sufiĉe granda kolekto de objektoj, kiujn oni povas bezoni". *Resurso* estas difinebla kiel 'provizfonto, ofte en la naturo': *resurso de nafto, de akvo, de karbo, de uranio*, ankaŭ *ekonomiaj resursoj.*

Skulpturo (Z). Laŭ PIV: Arto de skulptado. – Ĉu ni limigu al tiu signifo? Mi ŝatus allasi duan difinon, tiun de *skulptaĵo*, konforme al la principo de internacieco.

Supre (F). Estas bezonata difino por la signifo de *Supra Kunsido*, angle *summit meeting*, dane *topmøde.* Ŝajnas, ke la esprimo estas uzata en tradukita formo en multaj lingvoj, do ĝi estus akceptebla en tia formo ankaŭ en Esperanto.

Vilao = Villo (Z). Laŭ PIV: Eleganta somerdomo en la kamparo. – Ĉu ne estas internacie uzata *vilao* en la signifo de 'privata urba familia domo'? Mi konfesas, ke mi surpriziĝis pro la difino en PIV. Eble oni povus rezervi la vortformon *vilao* por la jene sugestita signifo.

Metaforaj vortoj

Oni ja povas uzi libere kiun ajn nocion en figura senco, sed kelkaj esprimoj tiel establiĝis en ordinara uzado kaj ricevis fiksitan signifon, ke ili devas esti difinitaj en vortaro kiel PIV. Kelkajn el tiu kategorio de vortoj mi ĉi tie pritraktas.

Karato (O1). PIV ĝin difinas pri perloj, diamantoj, oro. – La vorto estas tre ofte uzata figure pri alta homa kvalito. Ĉu ne fiksi tiun komunlingvan signifon?

Lakuno. PIV: Malplenaĵo, mankoloko en histo. – La vorto estas ofte kaj internacie uzata en la figura signifo de 'malplenaĵo nedezirinda kaj plenigenda'.

Loza. Krom en la signifoj difinitaj de PIV, "malstrikta, malstreĉita, malkompakta" (ekz. pri bluzo) kaj "ne enpakita" (kargo), la vorto estas uzata en figura senco: *loza pretendo, loza skizo.* Mi bonvenigus tiurilatan difinon.

Periferio (Z). Al la difino en PIV de geometria termino devus esti aldonita difino pri la komunlingve uzata metafora signifo: *periferia pritrakto de afero, periferia intereso, periferiaj kontaktoj.*

Vizio (O6). La du difinoj de PIV estas tre specialaj: "vidosensa halucino", kaj "objekto aŭ sceno, kiun dia revelacio vidigas al profeto". Sed la signifo, en kiu la vorto plej ofte estas uzata, mankas: 'krea imagpovo, kompreno pri ebloj de disvolviĝo, imagpova antaŭscio'.

Referencoj

Waringhien, Gaston (Ed.)
1970 *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto.* Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda. 37 + 1299 pp.

Wüster, Eugen
1923 *Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana. Kun speciala elmontro de la Zamenhof-a lingvouzo* (A–korn; nekompletigita). Leipzig: Ferdinand Hirt & Sohn. 66 + 576 pp.

Ricevita 1999 02